



Boletín

n° 450 Aprilo - Junio 2025



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949

Numero 450

Redakto-skipo

Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: José Antonio del Barrio

Retadreso de la bulteno:

bulteno@esperanto.es

angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun per-
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio
Federación Española de Esperanto

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: Ángel Arquillos López

Vicprezidanto: Alberto Granados Orcero

Sekretario: Manuel Parra

Vicsekretario: Elsa Martínez Castro

Kasisto: Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Vicente Manzano (Viko)

“ María Milagros Mezo

Junularaj aferoj: Pako Balibrea

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)

DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400 (pdf-a)

ISSN 2444-8397 (papera)

SALUTVORTOJ

Karaj gelegantoj,

Malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj de mia sano, mi pretas daŭrigi mian taskon informi per esperantaj aferoj, kaj danke al via kontribuo, ĉio enordas, kvankam neniam sufiĉos, ĉar mi scias ke multaj el vi partoprenas en esperantaj eventoj kaj poste vi ne kuraĝas skribi etan artikolon por kundividi vian sperton kun aliaj samideanoj. En Boletín vi rajtas aperigi ĝin kaj mi pretas realigi ĝin senprobleme.

En ĉi tiu numero, vi trovos artikolojn ĉefe pri la kongreso okazinta pasintmonate majo en la bela urbo Sorio. kaj la sekva, okazonta en Portugaleta, tre proksime de la bela Bilbao, kies grupo jam pretigas la gravan eventon.

Indas elstarigi la artikolon senditan de Humphrey Tonkin okaze de la omaĝo al S-no Rafaela Urueña, kiu estis nomumita Honora Prezidanto de UEA.

Kaj la artikolo pri la kongreso okazonta en Portugaleta, mi rekomendas legi ĝin kun trankvilo, ĉar temas pri la komenco de nova renkonto kun geamikoj de Esperantujo, ĉefe Hispanio.

Koran dankon pro via atento kaj dankegon al ĉiuj kunlaborantoj.

Ĝuu la legadon.

Ángel Arquillos

Redaktoro

ENHAVO

Salutvortoj	1
HEF Biblioteko partoprenis dum la Semajno de la Libro	2
Protokolo de la Ordinara Ĝenerala Kunveno	3
Sukcesa kongreso	5
Mallonga raporto pri la Hispana Kongreso en Sorio	6
Rafaela Urueña nomumita Honora Prezidanto de UEA	7
Vortoj de Humphrey Tonkin al Rafaela Urueña	8
Portugalete, la venonta kongresurbo	10
Pri grupoj kaj Asocioj	12
Internaciaj kongresoj dum la tuta somero	14
Nekrologe	15
Gajnintoj de la dua Esperanto-konkurso "Francisco Mañez"	16
Blas Infante kaj Andaluzia Himno	18
La poŝtaj vagonoj en Hispanio 1855-1993	20
75 datreveno de la Eŭropa Konvencio	22
Esperanto en Sevilja Lingva Renkontiĝo	23
Onomatopeoj en birdonomoj	25
La stranga angulo , ĉapitro 15	28
La kongresumunto	29
Artikolo pri la Historio de Esperanto en Zamoro	30
Iom pri matematiko (18)	31

HEF-BIBLIOTEKO PARTOPRENIS DUM LA SEMAJNO DE LA LIBRO

La Biblioteko Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio partoprenis denove ĉijare la virtualan ekzpozicion organizitan de HispanaPro (organizaĵo de la hispana Ministrejo pri Kulturo) okaze de la Tago de la Libro en aprilo. Ĉi-foje, nia biblioteko partoprenis per la verko "La espero", la himno esperantista. Historian ekzempleron eblas vidi en la paĝo 78 de la ekzpozicio en tiu ĉi ligilo: <https://hispanapro.cultura.gob.es/dia-del-libro-2025/>.



PROTOKOLO

Ordinara Ĝenerala Kunveno 03maj2025

La 3-an de majo 2025 je la 10:00 horo, laŭ kunvoko de la Prezidanto, okazis Ordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio kadre de la 83a Hispana Esperanto-Kongreso okazanta en Sorio, *Espacio Santa Clara*, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Aprobado de la protokolo de la antaŭa kunveno (8a de septembro 2024)
- 2.- Aprobado de la kontoj kaj kas-stato de 2024
- 3.- Aprobado de la raporto pri aktivajoj de 2024
- 4.- Informo pri la nombro de membroj
- 5.- Aprobado de la Buĝeto kaj la kotizoj por 2025
- 6.- Nomumo de María Rafaela Urueña kiel honora prezidanto de HEF
- 7.- Projektoj por la sekva jaro
- 8.- Kie okazos la venontjara kongreso
- 9.- Sugestoj kaj demandoj

Ĉeestantoj:

Partoprenas la kunvenon 37 individuaj membroj de HEF kaj ankaŭ estas reprezentataj la Grupoj: Bilbaoa, Madrida (Liceo), Libermanimo (Teruelo), Andaluza, Valencia, Segovia, Ekstremaĉura, Kantabra kaj Zaragoza (Frateco).

1- Aprobado de la protokolo de la antaŭa kunveno (8a de septembro 2024)

Ĝi estis publikigita en *Boletín* numero 447. Oni aprobas ĝin unuanime.

2.- Aprobado de la kontoj kaj kas-stato de 2024

La spezokonto kaj bilanco estis publikigitaj en *Boletín* numero 449.

La kasisto klarigas iujn enspezojn kaj elspezojn, menciante la eksterordinaran elspezon por renovigo de la sidejo (ŝanĝi fenestrojn kaj refarbi).

Aperas la demando, kial HEF ne elspezis por propagandi la UNED-kursojn, laŭ decido. Respondas la sekretario ke, malgraŭ la helpo de kelkaj volontuloj, niaj klopodoj ne sukcesis. Ŝajnas, ke por meti pagatan reklamon en sociaj retoj necesas ke HEF havu bankan karton, kaj ĝi ne havas.

La spezokonto kaj la bilanco estas aprobitaj.

3.- Aprobado de la raporto pri aktivajoj en 2024

La raporto pri aktivajoj en 2024 estis publikigita en *Boletín* numero 449.

Rubén Fernández komentas la punkton 5.5, pri la konservado de la havaĵo el la iama Muzeo de Esperanto en Sant Pau d'Ordal. Li opinias, ke la respondo de la magistrato ne estis kontentiga.

La raporto pri aktivajoj estas aprobita.

4.- Informo pri la nombro de membroj

Dum 2024, aliĝis 14 homoj kaj ekŝiĝis 24; el ili 4 forpasis kaj 14 estis eksigitaj pro plurjara nekotizo. Je la 31 de decembro 2024 estis 208 membroj.

5.- Aprobo de la buĝeto por 2025 kaj la kotizoj por 2026

La buĝeto por la jaro 2025 estis publikigita en *Boletín* numero 449. Ĝi estas aprobita Antaŭ du jaroj oni altigis la kotizojn por la membroj kiuj ricevas la bultenon papere (OM), la kolektivaj (KM) kaj la patronaj (PM).

Nun ni proponas lasi ilin senŝanĝaj por la venonta jaro 2026. Oni aprobas la proponon.

6.- Nomumo de María Rafaela Urueña kiel honora prezidanto de HEF

La estraro de HEF decidis nomumi *Honoran Prezidanton* al M^a Rafaela Urueña, pro ŝiaj grandaj servoj al HEF (la sola ina prezidanto) kaj al Esperanto. La formala ceremonio okazos morgaŭ, ĉe la fermo de la kongreso.

7.- Projektoj por la sekva jaro

La estrarano Francisco Balibrea klarigas sian planon organizi junularan aranĝon en julio 2026, antaŭ la hispana kongreso.

Plu okazadas la kursoj de Esperanto en UNED, laŭ la interkonsento inter ĝi kaj HEF. Por la lernojaroj 2025-26 estas plano enkonduki trian nivelon: B2.

8.- Kie okazos la venontjara kongreso

La estraro aprobis la proponon de la Grupo Esperanto de Bilbao, organizi la 84an Hispanan Kongreson de Esperanto en Portugaleta de la 14a ĝis la 18a de julio 2026. Membro de tiu grupo klarigas kelkajn aspektojn; la kongresejo estos la loka sidejo de UNED; estas planataj tri ekskursoj, inter ili, unu per ŝipo.

9.- Sugestoj kaj demandoj

Aperas plendo, ke la nuna kongresejo situas tre alte en la urbo, tiel ke por atingi ĝin oni devas trairi tre deklivajn stratojn.

La kunordiganto de la kursoj de Esperanto en UNED, nome de la instruista skipo, proponas al la HEF-estraro esplori la eblecon doni stipendiojn por pagi la matrikulon de la kursoj de E-o en UNED, kiel jam faras MEL (kaj aparte, kompreneble, de tiuj de MEL). La kondiĉoj por la disdonado devos esti bone prilaboritaj, li mem povus helpi, se necese. La kialo de tio estas, ke nuntempe tiuj kursoj funkcias kiel bona kaj prestiĝa propagando de nia lingvo.

Iu sugestas, ke tiajn stipendiojn prefere donu Fundación Esperanto.

Alia UNED-instruisto petas, ke HEF akiru bankan karton, ĉar tio estas necesa por meti pagatajn reklamojn en sociaj retoj.

La kunveno finiĝas je la 11:30 horo.

La sekretario: Manuel Parra Aprobita.

La prezidanto: Ángel Arquillos

SUKCESA KONGRESO



Partopreni en la kongreso de Soria estis bonega sperto, kaj mi ĉiam memoros ĝin kiel ion tre gravan en mia ĉiutaga vivo kiel esperantisto, ĉar ĉi-jare, pro mia sanstato, mi multe dubis ĉu resti hejme aŭ fari mian taskon kiel prezidanto de HEF, kaj post longa pripensado mi kuraĝigis min kaj mia tasko efektiviĝis senprobleme danke al bona etoso reganta en la kultura centro Espacio Santa Clara, restaŭrita antikva monaĥejo kie kunsidis amaso da homoj alvenintaj el pluraj landoj.

Legi miajn Salutvortojn por malfermi la eventon, estis kiel balzamo, kiu donis al mi kuraĝon por daŭrigi kaj ĝui la eksterordinaran programon, kiun la LKK preparis, kaj kiu tre interesis ĉiujn pro sia enhavo kaj siaj parolantoj, kiuj prezentis ilin kun granda intereso kaj entuziasmo.

Kiel poeziamanto, mi vere ĝuis aŭskulti miajn kolegojn deklamantajn belajn poemojn, kvankam mi ne partoprenis, mi esperas fari tion venontfoje, se eble.

Ĝi estis vera festo de poetoj kun prezento de multaj libroj, kiuj riĉigas nian esperantan kulturon. Dankon, tre dankon al ĉiuj pro la valora donaco, ĉar verki en Esperanto estas komplike, sed samtempe amuza tasko kaj nur vera esperantisto kuraĝas verki aŭ traduki neprofitcele en la lingvo internacia.

La urbo Sorio estas vere bela plena je monumentoj, kiujn ni ne forgesos kaj ili restos en mia memoro por longa tempo, ankaŭ la bongusta manĝaĵo indas menci. Kaj mi ne devas forgesi la ekskursojn, kiuj estas la ĉerizo sur la kuko, ĉar Sorio povas fanfaroni ne nur pri naturo sed ankaŭ pri arto abunde tra la tuta provinco. Malgraŭ mia sanstato mi kuraĝis partopreni, ekskursojn, interkonan vesperon kaj bonkvalitan bankedon.

La urbo Burgo de Osma estas arta juvelo, kiu impresis min kun belegaj domoj, luksa urbodomio kaj impresa katedralo, eĉ la bongusta manĝaĵo indas mencion. Por fini la tagon, ni promenis tra la dekliva strato de la vilaĝo "Calatañazor" por atingi malnovan kastelon de kie oni ĝuis belegan panoramon. Mankis nenio, dankon.

Vi scias ke mi de antaŭ multaj jaroj estis komitatano "A" por Hispanio, sed nuntempe, pro mia sanstato, mi ne kuraĝas vojaĝi eksterlande por partopreni komitatkunvenojn, kaj pro tio, nia samideano el Malago, emerita profesoro de la universitato, Carlos G. Spinola majoritate elektita de la estraro, volonte prenis la taskon.

Mi estas je via dispono kiel prezidanto de HEF. Mi ankoraŭ estas forta, kvankam la malsano estas degenera, mi esperas resti forta dum longa tempo, kaj kiel mi jam diris, mi estas je via dispono, se vi deziras elekti novan prezidanton. Mi ankaŭ estas redaktoro de Boletín, kaj mi kapablas daŭrigi la taskon, sed ĉio dependos de la tempopaso. Pormomente ĉio enordas kaj mi esperas pliboniĝi baldaŭ, ĉar mi kredas je mirakloj - .

Ángel Arquillos
Prezidanto de HEF

MALLONGA RAPORTO PRI LA HISPANA KONGRESO EN SORIO

La 83-a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en la kastilia urbo Sorio, inter la 1-a kaj 4-a de majo. Ĉeestis pli ol 150 homoj. Aliĝis malpli da eksterhispanianoj ol kutime, sed venis rimarkinde pli multaj homoj el Hispanio ol en aliaj kongresoj, el preskaŭ ĉiuj regionoj. Ŝajnas ke por homoj ekster Hispanio la urbo ne estas konata kaj aspektas tro fora, sed hispanoj bone konas la altiron de la loko.

La kongresejo estis la t.n. Espacio Santa Clara, malnova monaĥejo transformita al kulturspaco. Ĝi montrigis impona konstruaĵo, konvena loko por aranĝo kiel nia, sed en la komenco evidentiĝis iuj teknikaj problemoj, pro relative ĵusa adapto por la nova utiligo, kiuj iom post iom solviĝis danke al la penado de la LKK-anoj kaj teknikistoj.

En la tagoj antaŭaj al la kongreso oni anoncis diversajn agadojn direktitajn al la ekstera publiko. Estis malfermita publika ekspozicio pri Esperanto, per la novaj paneloj kreitaj de HEF. Okazis du prelegoj en la tradicia kazino en la urbocentro, kiujn gvidis respektive José Antonio del Barrio kaj Miguel Gutiérrez Adúriz. Enkonduka kurso de la lingvo estis aparta sukcesa, kun trideko da interesiĝantoj.

La kongreso estis vaste anoncita en la loka gazetaro. Por la solena inaŭguro alvenis la regiona televido, kiu prezentis mallongan raporton en la informa teleĵurnalo. Tiun ceremonion ĉeestis skabenino pri turismo; en aliaj momentoj vizitis nin la skabenoj pri kulturo kaj pri sporto, al kiuj estis donacita aro da libroj por la lokaj bibliotekoj.

La kultura flanko estis tre intensa, kun pli ol dudek prelegoj kaj laborsesioj pri diversaj temoj. La ĉefprelego temis pri poemo de Antonio Machado, analizita de la verkisto Antonio Valén, mem devenanta el Sorio. Oni prezentis plurajn novajn librojn, inklude de iuj plurlingvaj. Poezia vespero, kunordigita de Miguel Fernández, omaĝis la lokan poetinon María Ángeles Maeso, unu el kiuj libroj estas tradukita al Esperanto. En aparta diskejo, por la kongresanoj kaj por la ĝenerala publiko, koncertis JoMo. Ankaŭ estis anoncita koncerto de Kaj Tiel Plu, sed sanproblemo de la kantisto en la lasta momento devigis la organizantojn rapide serĉi anstataŭanton, kaj fine oni sukcesis venigi Clarissa, el Italio, kiu brile plenumis tiun defion. Filmoj, magio kaj kvizo kompletigis la amuzan parton de la kongreso.

La turisma flanko estis kovrita de la urbo mem kaj de duobla ekskurso al la arkeologiaj restaĵoj de la antaŭromia urbo Numantio. Postkongreso kondukis la restantajn kongresanojn al proksimaj historiaj urboj de la provinco, kiel El Burgo de Osma, Gormaz kaj Calatañazor.

Dum la kongreso okazis la oficiala Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio. La ĉefa decido estis la nomumo de María Rafaela Uruña kiel Honora Prezidanto de la asocio. Publika omaĝo al ŝi, al kiuj aliĝis vidence kelkaj homoj kontribuintaj al ŝia agado en la juraj kaj ĝenerala Esperanto-movado, fermis la kongreson.

Kaze ke vi ne povis partopreni la kongreson, pluraj eroj estis filmitaj, kaj iom post iom spektiĝas en la jutuba kanalo de HEF, ĉe: <https://www.youtube.com/esesperanto/>.

Toño



RAFAELA URUEÑA NOMUMITA HONORA PREZIDANTO DE HEF

Dum la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio, okazinta dum la 83-a Hispana Kongreso de Esperanto en Sorio, oni nomumis Rafaela Uruela kiel honoran prezidanton de la asocio.

Kiel fina programero de la kongreso, oni faris kolektivajn omaĝon al ŝi, kun speciala memorado pri ŝia edzo, Luis Hernández, kiu ĉiam akompanis ŝin dum ŝia agado, kaj kiu forpasis antaŭ kelkaj monatoj. La omaĝon prezidis Ángel Arquillos, prezidanto de HEF, kaj Mati Montero, prezidanto de la LKK, kaj prezentis José Antonio del Barrio kaj Ana Manero. Oni montris dum ĝi videajn salutojn de Duncan Charters (nuna prezidanto de UEA), Mark Fettes, Humphrey Tonkin, (kies kontribuon, kiu venis skribe kaj laŭlegis Manolo Parra, vi povas legi en sekva artikolo), Michela Lipari kaj José María Rodríguez Hernández (multfoje kunlaboranto en agadoj de la juristaj asocioj). Fine, ŝi ricevis omaĝplaton nome de HEF, kaj ŝi faris malgrandan kaj kortuŝan paroladeton dankante la omaĝon.

Kvankam legantoj de Boletín bone konas ŝiajn meritojn, jen malgranda biografio:

BIOGRAFIO



María Rafaela Uruña Álvarez naskiĝis la 20-an de junio 1942 en Bilbao (Hispanio).

Ŝi studis en Valladolid kie ŝi diplomiĝis pri Juro en la samnoma fakultato de la Universitato de Valladolid (Valladolid), atingante “eksterordinaran premion”. En 1979 ŝi doktoriĝis pri Juro kaj ekde 1986 ŝi estis profesorino pri Internacia Juro kaj Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Valladolid, ĝis sia emeritiĝo. Dum 11 jaroj ŝi gvidis kursojn pri Naturjuro kaj Internacia Juro en

Rafaela Urueña estas aŭtorino de diversaj libroj kaj artikoloj pri medio-protektado kaj juro de la maro. Ŝi estas membro de la Katedro “Jean Monnet” pri Eŭropa Juro kaj fondinta membro de la Instituto pri Eŭropaj Studoj en la Universitato de Valladolid.

Ekde 1960 ŝi aktivas en la Esperanto-movado, unue en la loka, kaj poste en la nacia kaj internacia movado, kaj dum pluraj jaroj ŝi gvidis kurson pri Esperanto per “Radio Valladolid”.

De 1978 ĝis 1984 ŝi estis prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio.

Ŝi estis prezidanto de Jura Esperanto-Asocio (EJA) de 1991 ĝis 1995 kaj de 2010 ĝis 2015 kaj poste sekretario de Internacia Jurista Esperanta Asocio (IJEAA).


Ofte ŝi prelegis pri juraj temoj en la kadro de Internacia Kongresa Universitato dum Universalaj Kongresoj, kaj estis la Rektorino de IKU dum la Universala Kongreso okazinta en 1993 en Valencio.

Aŭtoro de la libroj “ABC de la Eŭropa Unio; Enkondukon en la Eŭropan Juron”, “Eŭropa Unio, paŝon post paŝo” kaj kune kun D-ro Mark Fettes, de “Fundamento de la Homaj Rajtoj”.

S-ino Urueña Alvarez estas dumviva asociita membro de AIS San Marino. En 2010 ŝi ricevis la premion Ada Fighiera Sikorska, kaj estas Honora prezidanto de la laborgrupo “Esperanto por UN”.

En la 103a Universala Kongreso en Lisbono ŝi estis elektita Honora Membro de Universalaj Esperanto-Asocio, kaj en 2025 ŝi estis elektita honora prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio

Toño



VORTOJ DE HUMPHREY TONKIN POR LA OMAĜO AL RAFAELA URUEÑA

Oni foje diras, ke tiuj homoj naskiĝas esperantistoj, kaj nur poste ili trovas la lingvon al kiu ili estis destinitaj. Ili ne bezonas konvinkiĝon ĉar ili estis konvinkitaj denaske. Aliaj simple lernas ĝin ĉar ili renkontas ĝin kaj trovas ĝin interesa. Ĉi lasta kategorio envenas-eliras la movadon laŭ la blovado de la vento; sed tiuj kiuj naskiĝas spirite esperantistoj restas konstantaj kaj fidelaj. Rafaela Urueña apartenas al la unua kategorio: ŝi pensas, agas, kondutas laŭ la spirito de la Internacia Lingvo.

Mi konas ŝin jam pli ol kvindek jarojn. Ni laboris kune en Universala Esperanto-Asocio, precipe kiel kolegoj-komitatanoj. Mi frue eksciis, ke ŝi ne nur laboras en la internacia movado, sed ankaŭ okupis, kune kun sia edzo, ŝlosilan lokon ene de la hispana landa asocio. Min aparte impresis la fakto, ke ŝi perfekte ligis kaj ligas Esperanton kun la prioritatoj de la profesia vivo – studado kaj esplorado pri regiona kaj internacia juro. Tiuj scioj riĉigas ŝian esperantistan vivon kaj samtempe Esperanto riĉigas kaj riĉigas la profesion vivon.

Mi ĉiam multon lernas el ŝiaj verkoj en Esperanto, ekzemple pri lingvaj aspektoj de internacia juro, pri lingva diskriminacio kaj rilataj temoj, kaj pri lingvaj aspektoj de internaciaj organizaĵoj. Kiam la 78-a Universala Kongreso okazis en Valencio, ŝi rolis kiel rektoro de la Internacia Kongresa Universitato, prelegante pri klerigo por la 21-a jarcento. En tiu prelego ŝi diris: “Fondi Novan Internacian Ordon signifas malferman cerbumadon pri la fundamentaj rajtoj kaj universalaj valoroj kiujn tiu ordo devos garantii.” Jes ja.

Venis tiu 21-a jarcento. Pli gravas ol iam ajn antaŭe fideleco al tiuj universalaj valoroj. Sed tro multaj homoj ne aŭskultas: ni riskas retroiri. Gravegas, ke ni daŭrigu la laboron. Kvankam, kara Rafaela, ni honoras vian grandegan kaj fidelan kontribuon al la realigo de tiuj universalaj valoroj, kaj ni notas vian fidelecon al la zamenhofs-ideo, la laboro ja ne estas finita. Ĝuste en la nuna tempo la mondo frontas krizon en kiu oni pridubas la internaciismon tiel pene kreitan tra la ĵus pasintaj jardekoj, kaj en kiu oni tro ofte neas la internacian kunlaboron kiu komencis plibonigi la materian vivon de multaj homoj, kaj la nocion, ke, finfine, ni estas “homoj kun homoj”. Ni bezonas vin, kara Rafaela, por memorigi nin. Daŭrigu vian laboron por la zamenhofs-ideo, vian fidelecon al la spirito de Esperanto, kaj vian kredon je internaciismo kaj la internacia idealo!

Humphrey Tonkin
Honora Prezidanto, Universala Esperanto-Asocio

PORTUGALETE, LA VENONTA KONGRESURBO



Dum la pasinta HEF-kongreso en Soria, oni aprobis, ke la venonta kongreso, la 84a, okazos en Portugalete de la 14a ĝis la 18a de julio 2026. Por tiuj, kiuj planas partopreni ĝin, jen kelkaj trajtoj pri la urbo.

Portugalete troviĝas 12 km. norde de Bilbao, ĉefurbo de provinco Bizkaia (Bizkajo), ĉe la maldekstra bordo de la mara rivero Nerviono. Tiu rivero naskiĝas ĉe montaro kiu signalas la sud-

dan limon inter la provincoj Bizkajo kaj Burgoso. Kaj en Bilbao troviĝas la limo inter la dolĉa akvo de la rivero kaj la sala de la maro. Portugalete troviĝas preskaŭ tie, kie la rivero Nerviono eniras la maron (la atlantikan oceanon). Kiam oni eliras de Bilbao norden, sekvante la maldekstran riverbordon, estas 4 sinsekvaj urboj, ligitaj unu al la aliaj. Nome, Barakaldo, Sestao, Portugalete kaj Santurce (nun nomata Santurtzi).

La urbo estis fondata en 1322. Ĝi etendiĝas sur nur 3,21 km². Tio signifas ke eblas piediri de unu al alia urbolimo dum pli-malpli nur 30 min. Tamen, ĝi enhavas ĉ. 45.000 loĝantojn, t.e. ĉ. 15.000 loĝantojn/km², unu el la plej alta denseco de Hispanio.

Portugalete famas pro sia “pendoponto”, al kiu eĉ oni dediĉis konatajn kantojn. Fakte, ĝi ne estas ponto, sed transportilo inter ambaŭ bordoj de la rivero. En la dekstra bordo troviĝas la urbo Getxo (*pr. Geĉo*), la tria plej granda de Bizkajo post Bilbao kaj Barakaldo. La “pontono” oni inaŭguris en 1893 post 3 jarojn da konstruado kaj estis elpensita de la inĝenieroj Alberto Palacio kaj la franca Ferdinand Arnodin.



Ekde la jaro 2006 estas monda heredaĵo de UNESCO. Dum ĝiaj pli ol 130 jaroj kolektiĝis multe da okazintaĵoj. La plej tragika eble estis ĝia dissaltigo per eksplodigiloj la 27an de junio de 1937, dum la hispana interna milito, fare de membroj de la anarkisma bataliono Malatesta, por malhelpi la alvenon de faŝismaj trupoj al Portugalete el la dekstra riverbordo. Sur la supra foto, italaj soldatoj, kiuj batalis favore al diktatoro Franco (*pr. Franko*), sidas sur la dekstra flanko de la rivero antaŭ la detruita ponto.



La ponto altas ĝis 61,3 m. dum la relo situigas ĉ. 50 m. super la akvo (dependas de tajdo).

Ĝis fino de la 19a jarcento Portugalete ankaŭ famis pro tute alia afero: tie kie kunfrapiĝis akvo de la rivero kaj de la maro formiĝis sabla barilo, kiu malfaciligis navigadon de ŝipoj, eĉ okazigis grundadon de nemalmultaj el ili. Kiel memorigilo de tiu epoko, restis ĉe la apudrivera promenejo tajdomezurilo, kies figuro povas trompi vin ĉar tre similas al staranta horloĝo, sed certe ne estas tia.

Apude de tiu mezurilo videblas balustrado, kiu estas origina de plaĝo ne plu ekzistanta. Sur ĝia sablo oni konstruis naĝejojn kaj altlernejon por maristoj.

De tiu balustrado, promenejo plilongiĝas ĝis lumturo per la tiel nomata “fera kajo”, inaŭgurita komence de la 20a jarcento de la hispana reĝo Alfonso la 13a, kies celo estis forigi la tre konata “sablan barilon de Portugalete”. Kaj oni sukcesis.




Kiel multaj aliaj vaskaj lokoj apudmaraj, Portugalete estis konstruita sur deklivo, origine klifo kiu falis ĝis la maro. Sed dum la lastaj jaroj la Magistrato instalas multe da aŭtomataj platformoj kaj ŝtuparoj, kiuj helpas la loĝantaron grimpi la oftajn deklivojn, des pli ke granda parto de la lokanoj estas maljunaj. Tamen, apud la rivero estas longega kaj bela promenejo tute glata.

Por fini ni iru al la as-tempo por doni diversajn praktikajn informojn:

*Kongresejo estos la sidejo de UNED (Nacia Universitato por Neĉeesta Lernado). Bela konstruaĵo ĉirkaŭata de agrabla ĝardeno plenplena de altaj arboj.

* Estas tri metroaj stacioj: Abatxolo (*pr. Abácolo*), Portugalete kaj Peñota (*pr. Penjota*). Ĝis la centro de Bilbao oni bezonas 20 min. La stacio plej proksima al kongresejo estas “Peñota” (5-10 min. piede).



Simbolo de la metroo: 

* Ankaŭ estas busoj diversaj kaj du stacioj de RENFE: Portugalete kaj Peñota (ĉi lasta, proksima de la kongresejo).

*Por veturi, ni rekomendas karton nomata “Barik”. Validas por ĉiuj veturiloj kaj vojaĝoj estas pli malmultekostaj. Ĉiu karto povas esti uzata de diversaj personoj.

Iom post iom ni donos pli da informoj pri la kongreso kaj respondos viajn demandojn ĉe **portukongreso@gmail.com**

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Madrido

AGADOJ OKAZE DE LA SEMAJNO DE LA LIBRO



Kiel tradicie en tiuj datoj, la madridaj grupoj aŭ individuaj esperantistoj partoprenis agadojn okaze de la Tago de la Libro.

Du junuloj, Irene kaj Adam, partoprenis en la sinsekva legado de Don Quijote en la kulturcentro Círculo de Bellas Artes, la 23-an de aprilo. Ĉijare la legado estis pli longa ol kutime, kaj ili legis la tutan 7an ĉapitron de la verko. Jam troviĝas en la reto la filmo kun ilia legado, en la adreso: <https://www.youtube.com/watch?v=fkjGSUVOIag> (ĉ. 1 h 35 m)

Madrida Esperanto-Liceo ankaŭ partoprenis en “La Nokto de la libroj”, kiun organizas la madridregiona registaro la 25-an de aprilo, per la prezentado, fare de ĝia aŭtoro, Ana Manero, de verko pri la pentristino Maruja Mallo, apartenanta al elstara periodo de la hispana kulturo en la 20a kaj 30a jardekoj de la 20a jarcento. La libro, kun titolo: “Maruja Mallo: Mucho más que una artista de vanguardia”, kaj eldonita de SATEH (SAT en Hispanio), estas dulingva, hispana kaj esperanta.

En Fuenlabrado la loka esperantista asocio FEL estis invitita partopreni la 25-an en aktivado de disvastigo de la libroj en loka lernejo. Oni muntis budon kun libroj en Esperanto kaj respondis la demandojn de vizitantoj.





La 26-an de aprilo oni organizis omaĝon al María Ángeles Maeso en la kvartalo Usera. Mati Montero legis poemon en Esperanto, el la antologio “Ni iras, vidas”, kaj anoncis la omaĝon kiun oni faros al ŝi dum la Esperanto-kongreso.

Alia libroprezentado estis anoncita por la 28-a de aprilo, sed fine devis esti prokrastita pro la perturboj en la elektra reto kiuj okazis en la tuta Hispanio tiun tagon. La prezento okazis fine la mardon, 6-an de majo, en la sidejo de HEF. Temas pri romano de la itala esperantisto kaj arabisto, Viviana, titolita “Serendipeco”, eldonita dulingve itale kaj esperante, sub pseŭdonimo Stasia



Chyllicki, kiu rilatas sperton duonmembiografian, pri familia malkovro kaj renkonto, en kiu la internacia lingvo rolis. La ĉeestantoj montris grandan intereson

INTERNACIAJ KONGRESOJ DUM LA TUTA SOMERO

Multaj Esperanto-renkontiĝoj estas antaŭvidataj por la venontaj monatoj, je loka, landa aŭ internacia skalo.

La plej grava estos la Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en la ĉeĥa urbo Brno (aŭ Burno) inter la 26-a de julio kaj la 2-a de aŭgusto. Aliĝis ĝis nun pli ol 1000 homoj, el kiuj preskaŭ 30 el Hispanio. Vi povas aliri ĉiujn detalojn en tiu ĉi ligilo: <https://uk.esperanto.net/2025/>, kaj speciale en la Dua Bulteno ĉe: <https://uk.esperanto.net/2025/duabulteno>.

Preskaŭ 150 homoj aliĝis jam al la 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) kiu okazos en Cisarua (Indonezio) de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025. Indonezio estas perfekta loko por pasigi someran ferion, kun mirindaj pejzaĝoj, kultura diverseco, kaj riĉa sperto kun samideanoj tra la tuta mondo. Krome, kiel ni informis en pasinta numero, TEJO malfermis fonduson “Partoprenu IJK-n” por ebligi la amasan partoprenon de aziaj kaj oceaniaj junuloj en la evento, al kiu ĉiu povas kontribui. Ĉiujn detalojn trovu ĉe: <https://ijk2025.tejo.org/>.

La Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos en Beogrado (Serbio) inter la 19-a kaj 26-a de julio. Vidu informojn en la retejo de ILEI, ĉe: <https://www.ilei.info/>.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazigos sian kongreson ĉijaran en Francio, en la kastelo Greziljono inter la 9-a kaj 16-a de aŭgusto.

Krome, okazos multaj aliaj renkontoj. Serĉu en EventaServo.org, por trovi tie ĉiujn detalojn



CISARUA 2025

NEKROLOGE

Pepe Añó Belda (mortinta februare de 2025 en Valencio) ludis gravan rolon en la Infana Kongreso okazinta en Yátova samtempe kun la Universala Kongreso en 1993. Li ankaŭ aktive partoprenis kaj kunlaboris en la Esperanto-kongresoj de Valencio kaj Murcio fine de la pasinta jarcento kaj komence de la nuna.

Jam en la 1980-aj jaroj li estis aktiva en la instruado kaj disvastigado de Esperanto. En marto 1986 li partoprenis en la unua instruado de Esperanto per la tiel nomata **Valencia Metodo**, dum speciala semajnfina kurso en Cheste, organizita de **Dennis Keefe**, usona esperantisto kaj pioniro de modernaj instru-metodoj. Tie li, kune kun Ramón Diago, Pasqual Pont kaj aliaj, gvidis grupo-laborojn uzante ekzerco-foliojn, kiuj poste formis la bazon de la **BEK-Kurso**.

Dum tiu epoko li ofte emfazis ke Esperanto estas ŝlosila lernilo por infana lingvolernado. Li substrekis etimologiajn similecojn inter Esperanto kaj aliaj lingvoj — ekzemple: *bildo* rilatas al la germana *Bild*, *preni* al la franca *prendre*, *ŝarko* al la angla *shark* — montrante unikan interesiĝon pri vortdevenoj en Esperantujo. Li ankaŭ instruis Esperanton al infanoj, kvankam la preciza loko ne estas dokumentita.

Pepe desegnis belajn broŝurojn kaj verkis du librojn por instrui Esperanton: *La ABC de Esperanto* kaj *La AEIOU de Esperanto*, el kiuj unu aperis en KD-formo. Tiuj verkoj estis prilaborataj dum multaj jaroj kaj uzataj en edukaj kunteksto. En 1987 li kunlaboris per siaj desegnaĵoj en la libro *Kurso Práctico Elemental de Esperanto*, eldonita de Félix Navarro, en kiu liaj bildoj formis ian bildvortareton.

Li kontribuis ankaŭ al la **Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo** — konata kiel la “Katalunaj Semajnoj”, organizata ĉiu aŭtuno en la kataluna marbordo inter 1993 kaj 2018 — kunlaborante kun **Luis Serrano Pérez** pri grafika dezajno.

Interesita pri lingvoj, li kreis tabelon enhavantan milojn da vortoj en dek lingvoj, inkluzive de Esperanto, por montri iliajn similecojn kaj etimologiajn rilatojn.

En 2013 li kunorganizis, kune kun Enric Baltazar, renkontiĝon de esperantistoj en Oliva.

En la pensiulejo Campanar li faris prelegojn pri Esperanto por emeritoj, inter kiuj li estis tre ŝatata kaj estimata. Li ankaŭ havis gravan rolon en la dezajno de la bulteno *Valencia Luno*.

En la lastaj du jaroj de sia vivo, li kuraĝe alfrontis batalon kontraŭ kancero, estante submetita al pluraj traktadoj.



GAJNINTOJ DE LA DUA ESPERANTO-KONKURSO

“Francisco Máñez”

La 27-an de marto 2025, en la biblioteko de la Fondaĵo Cajacheste, kunvenis la kvalifika ĵurio de la 2a Esperanto-Konkurso “Francisco Máñez”. Post detala pritakso de la ricevitaj verkoj – taksitaj anonime kaj laŭ la regularo – estis deciditaj la jenaj premioj:

* **Unua Premio** (1000 €): Françoise Noireau (Francio), pro “Amasa distanca instruado en Afriko per Vacapo”

* **Dua Premio** (600 €): Pablo Busto (Sevilo, Hispanio). pro “Disvastigo de Esperanto per enhavo-kreado en amuzado-platformoj”

* **Tria Premio** (400 €), dividita inter: Fabio Silva (Brazilo) pro “Projekto esperantigi Poŭzalegron” kaj Antonio Alcázar (Teruelo, Hispanio) pro “Voludi” (apo por lerni Esperanton)

* **Honora Mencio**: Gada Azizieh (Ceste, Hispanio), pro “Ceste, mia urbo”

La ĵurio ĉefe taksis la novecon, originalecon, fareblecon kaj daŭripovon de la proponoj, la eblan efikon al la disvastigo de Esperanto, kaj la kvaliton de la prezentado.



SUR LA FOTO: Nia samideano Elías Hernández Capdevila ricevas la diplomon nome de la ĉefa premiito Françoise Noireau, flanke de la urbestro de Ceste, José Morell, kaj la skabenino pri kulturo, M^a Ángeles Llorente.

Organiza Komitato de la Konkurso

* Rafael Navarro Valle)Ateneo “*La Alianza*” de Cheste) –Ĉefa organizanto

- M^a Ángeles Llorente Cortés)Konsilantino pri kulturo, Magistrato de Cheste) – Inspirplena kaj nelacigebla laborantino, kiu rolis kiel nia ligo kun la oficialaj instancoj de Cheste, ebligante fruktodonan kunlaboron
- José Casas París)Fondaĵo Cajacheste) –Gastiganto, tre sindediĉa helpanto kaj provizanto de valora konsilo pri administraj kaj impostaj aspektoj
- Rosa Zanón Ferrando)Esperanto-Grupo Cheste) –La animo de la loka movado, kun multflanka subteno
- Ramón Diago Marco Esperanto-Grupo Valencio) –Sekretario kaj unu el la ĉefaj iniciatintoj
- Raúl Salinas Monteagudo Esperanto-Grupo Valencio) –Respondeculo pri teknika subteno, retejo kaj komunikado

La ceremonio por anonci la rezulton kaj disdoni la premiojn okazis la 25-an de aprilo, en la sidejo de la Fondaĵo CajaCheste, kun reprezentantoj de la asocioj kunvokitaj. Ankaŭ ĉeestis la urbestro de Cheste, José Morell, kaj kelkaj magistratanoj. Ĝin honoris per sia ĉeesto la speciala gasto Juan Andrés Perelló, direktoro de la organizaĵo Casa Mediterráneo, kies longa kariero kiel diplomato kaj eŭroparlamentano donis al la evento apartan gravecon.

Raporton pri la ceremonio oni povas legi en la retejo de la urbo, ĉe: <https://www.cheeste.es/noticia/ii-concurso-internacional-francisco-manez-celebra-gala-entrega-premios>, kaj videon de la tuta evento oni povas spekti ĉe: <https://valencia.esperanto.es/eo/2025/05/04/filmo-premiadono-konkurso-francisco-manez-cheeste-2024/>.

En Cheste, la 27-an de aprilo 2025
nome de la Organiza Komitato,
Raúl Salinas Monteagudo

BLAS INFANTE KAJ LA ANDALUZIA HIMNO

Antaŭa baza enkonduko

La Andaluza aŭtonoma regiono estas vasta lando-spaco situanta sude de Hispanio, kies surfaca areo estas je pli ol 87000 km². Ĝi konsistas el ok provincoj kaj ĝia enloĝantaro atingas la nombron je pli ol 8,6 milionoj. Kiel supozeble, Andaluzio havas sian proprajn simbolojn, forĝitajn tra kelkaj jarcentoj de konstruado de ĝia identeco. Verdire, oni devas atendi ĝis ĉirkaŭ 1920-1930 por klare vidi tiujn simbolojn firme establitaj. Meze de tiuj procezoj elstaras la figuro de Blas Infante Pérez (1885-1936), andaluza advokato, notario, eseisto, plur-faka klerulo*. Estis li kiu difinis la flagon (verda kaj blanka), la blazonon (surbaze de la mita Herkulo) kaj la himnon**. Ekde 1981, en ĉiu 28-a de februaro estas celebrata la festa Tago de Andaluzio. Tiu dato estis fiksita memore al la referendumo pri aŭtonomeco okazinta en la regiono la 28-an de februaro de 1980.



* *Pri Blas Infante -historie konata kiel la Patro de la andaluza naciismo- direndas ke li naskiĝis en la vilaĝo Casares (elp. kasares, provinco Malago) en 1885 kaj estis pafmortigita en aŭgusto de 1936, fare de la ribeluloj de la armea puĉo kiu okazigis la Hispanan enlandan militon. Blas Infante apartenis al mezbonhava etburĝa familio; li estis grava intelektulo, eseisto, advokato kaj notario. Lia plej grava verko estas eble Ideal andaluz (1915, Andaluza idealo). Tra sia vivo, li interesiĝis pri multaj diversaj kulturaj aferoj. Inter kelkaj aliaj lingvoj, li lernis la araban kaj Esperanton. Tutercte, li neniam estis aktiva esperantisto, tamen oni scias ke, sub influo de kelkaj amikoj siaj (ekzemple, la posta deputito de la hispana parlamento, la arkitekto Francisco Azorín Izquierdo) li eklernis la zamenhofan ĉirkaŭ 1920, kaj ke li estis membro de UEA en 1922 kaj 1923. Kiel tragedia kuriozaĵo, la horloĝo kiun li surhavis la tagon de lia murdo estis fabrikita de la svisa horloĝa entrepreno Movado, kutime uzataj de la esperantistoj en tiuj jaroj. Aldone, en lia persona biblioteko aperis 14 libroj en la lingvo internacia.*

***Kompreneble, ne estas la celo de tiu ĉi mallonga eseo profunde analizi tiujn aferojn. Tamen, almenaŭ mi diru ke ŝajnas ke la koloroj blanka kaj verda estis elektitaj pro diversaj kialoj: verda estas la koloro de la kamparoj, blanka tiu de la andaluzaj tipaj vilaĝaj domoj; verda estas la koloro de la espero, blanka estas tiu de la paco. Aldone, ne mankas iom mitaj historiaj ligiloj al standardoj de la islama epoko, ĉefe al tiu de la kalifo Jakub al-Mansur (1160-1199). Pri la blazono, estis ĝi dezajnita de Blas Infante mem, surbaze de la Kadiza blazonŝildo, kie du dresitaj leonoj aperas ambaŭflanke de la heroo Herkulo kaj ties kolonoj, laŭtradicie situantaj ĉe la mar-kolo de Ĝibraltaro.*

Pri la Himno

Ja la plej grava motivo de tiu ĉi artikolo estas la esperantigo de la Andaluza Himno, kio alvenis al mia kapo post la peto de iu samideano korekti tradukon faritan de li. Tiam mi decidis fari mian propran tradukon, kune kun tiu ĉi enkonduka eseo. La teksto de la andaluza himno estis verkita de Blas Infante en 1933, kaj ĝi estis adaptita al la melodio de tiutempa popola religia kanto, nome *Santo Dios* (Sankta Dio). La muzikaj notacioj (kaj por piano, voĉo kaj bando) estis faritaj de la sevila orkestrestro José Castillo Díaz. Tiu komponaĵo iĝis la oficiala himno de la regiono en 1982.

El nura politika vidpunkto, direndas ke Blas Infante establis la bazojn de la andaluza naciismo, sed direndas ke li samtempe estis konvinkita homaranisto, kiu nur konceptis andaluzismon kiel parton de sia amo al la tutmondaj homaj grupoj. Tutcerte, Infante estis homo el maldekstraj ideoj, proksimaj al anarkiismo, socialismo, federaciismo kaj aliaj tiutempaj movadoj. Pli specife, li ege zorgis pri la penigaj kaj suferigaj sklavecaj laboraj kondiĉoj de la andaluzaj kamparaj tag-laboristoj, kaj estis unu el liaj plej gravaj celoj plibonigi tiujn neakcepteblajn ekspluatatajn kondiĉojn, se necese, pere de la komunigo de agraj terenoj.

Kaj nun mi jene prezentas mian tradukon. Mi diru, ke mi preferis traduki iom libere kelkajn partojn, respektante la animon de la teksto, sed samtempe elektante kaj adaptante kelkajn vortojn, silabojn kaj esprimojn, kun la celo ke ĝi povu esti kantata, se tion oni deziras. Do, iu "adaptiĝinta taŭga longo" de la frazoj estas preferata al la nura laŭlitera traduko. Subaj pied-notoj* montros la ĉefajn "licencojn" faritajn de mi.

La standardo blanka kaj verda
post milit' jarcenta revenas
je dir' de pac' kaj espero
sub la sun' de nia tero

Andaluzoj, ree venu al star'!
Estu al vi ter' kaj liberec'!
Estu por Andaluzi' libera
kun hispanoj kaj ja la homar'!

Ni, andaluzoj, deziras
brave esti tio, kio ni estis
lumaj homoj kiuj, al ĉiu homo
pri anim' homa provizis

Andaluzoj, ree venu al star'!
Estu al vi ter' kaj liberec'!
Estu por Andaluzi' libera
kun hispanoj kaj ja la homar'!

-
- *Pro metrika kialo -sed ankaŭ pro plia soleneco- "standardo" estas preferita al "flago" (bandera).*
 - *Ree venu al star'.* Originale: levantaos, kio pli ĝuste estus esperantigita per la vorto "stariĝu". Tamen, enkadrigi tie la vorton stariĝu tute malebligus kaj rim(iĝ)on kaj verso-longon.
 - *Cele eviti la uzadon de la akuzativo -kio ege malfaciligus eventualan rimojn- estas uzata "estu al vi" anstataŭ la pli laŭlitera "petu teron kaj liberecon" (Pedid tierra y libertad).*
 - *Ekzistas pli revoluciema versio kiu forigas la mencion pri Hispanio, kaj anstataŭigas ĝin per la vortoj "Por... la popoloj kaj la homaro" (Por... los pueblos y la humanidad)*
 - *Kiel resumo de lia bela idearo, sciu ke li iam skribis tiujn du frazojn:
"Mia naciismo, antaŭ ol andaluza, estas homara" (Mi nacionalismo, antes que andaluz, es humano)
"Ni ne estas proletoj nek burĝoj. Nur homoj" (No somos proletarios ni burgueses. Simplemente hombres)*

Juan García del Río

LA POŝTAJ VAGONOJ EN HISPANIO

1855-1993

Ĝis la mezo de la 19-a jarcento diliĝencoj plejmulte estis uzataj en Hispanio por la transportado de poŝtaĵoj. Tamen, en tiuj jaroj, okaze de la konstanta konstruo de fervojaj linioj tra la tuta Hispanio, oni komprenis, ke vagonaroj estus pli efikaj kaj rapidaj rimedoj por distribui leterojn kaj pakaĵojn. En la jaro 1855 ekcirkulis en nia lando la unuaj vagonoj speciale konstruitaj por transporti poŝtaĵojn. La unua linio iris de Albalcete en Madridon, ĝi estis konata kiel "Mediterranea Linio". Baldaŭ la tuta lando estis unuigita radie kun Madrido pere de ĉi tiu servo, tiel en preskaŭ ĉiuj vagonaroj unu el ili estis poŝta vagono.



La Poŝta Servo ekkomprenis, ke ĉi tiuj poŝtaj vagonoj ne nur povus esti utilaj por transporti poŝtaĵojn, tiel ene de ili poŝtaj funkciuloj povus profiti la transportadon por klasifiki, afrank-stampis kaj distribui la sendaĵojn akceptitajn. Tiel, vagonoj haltiĝis ĉe ĉiuj stacidomoj tra fervoja linio, okaze de ĉiu halto oni ŝarĝis en la vagonon sakojn plenajn de poŝtaĵoj havigitaj de la loka poŝta funkciulo. Ene de la vagono aliaj funkciuloj klasifikis la sendaĵojn, okaze de la lasta haltejo granda parto de la poŝta laboro jam estus plenumita. Ĝenerale ekzistis en ĉiu vagonaro du poŝtaj vagonoj. Ene de unu el ili amasiĝis sakoj, tiuj kun poŝtaĵoj jam klasifikataj kaj aliaj por klasifiki. Sur la alia vagono kelkaj funkciuloj klasifikis kaj afrank-stampis la sendaĵojn. Plejofte tiuj vagonoj cirkulis en la lastaj pozicioj de la vagonaro. Ĉiuj poŝtaj fervojaj linioj finiĝis en la stacidomo Chamartín, en Madrido. Tie, oni starigis en la jaro 1971 konstruaĵon por akcepti kaj distribui ĉiujn poŝtaĵojn.



Poŝtmarko eldonita okaze de la 25-a datreveno de la lasta cirkulado de poŝta vagono.

Fine de la pasinta jarcento la nombro de leteroj kaj poŝtaĵoj akceptitaj draste malpliĝis, samtempe kamionoj kun grandaj konteneroj kapablis atingi eĉ la lastajn punktoj de nia lando, ĉefe tie kie vagonoj ne cirkulis. Do, poŝtaj vagonoj jam ne estis necesaj, tiel la 30an de junio 1993 eliris el la madrida stacidomo Chamartín la lasta poŝta vagono en Hispanio. Hodiaŭ, la memoro de tiuj transportiloj nur ekzistas en la afrank-stampoj markitaj ene de tiuj vagonoj



Kelkaj afrank-stampoj markitaj ĉe la poŝtaj vagonoj



Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj

fervojista@esperanto.ac

75 DATREVENO DE LA EŬROPA KONVENCIO PRI HOMAJ RAJTOJ KAJ FUNDAMENTAJ LIBERECOJ

La Konsilio de Eŭropo, kun sidejo en Strasburgo (Francio), naskiĝis en 1949, kadre de la movado por Eŭropa Unuiĝo, por protekti la europajn valorojn kaj la demokration, kaj plenumon de homaj rajtoj. Baldaŭ, post sia fondo, la Konsilio starigis la Eŭropan Konsilion pri Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj liberecoj, proklamitan en Romo la 4-an de novembro 1950 kaj ekvalidan la 3-an de septembro 1953. Tio estas la unua regiona pakto kiu reprenas la rajtojn kaj principojn de la Universala Deklaracio de U.N.

Laŭ la Konvencio, civilaj kaj politikaj rajtoj devas esti garantiataj en la konstituciaj leĝoj de la membroŝtatoj, apartenantaj al Konsilio de Eŭropo. Apud la rajtoj de vivo, temas pri la rajtoj de libereco, sekureco, justa juĝo, privata vivo kaj loĝado, de libero pri penso, konscienco kaj religio, libero pri esprimo, manifestacio kaj asociiĝo ktp. Aldone, oni garantias apelacian proceduron per kiu ĉiu civitano povas postuli antaŭ naciaj tribunaloj, defendon de tiuj agnoskitaj rajtoj.

La Kortumo konsistas el samnombraj juĝistoj kiom estas membroŝtatoj de la Eŭropa Konsilio. Oni permesas individuajn plendojn antaŭ la Kortumo.

La Eŭropa Kortumo rajtas eldiri verdikton kondamnante ŝtaton aŭ agnoski al individuo justan riparadon de la damaĝo.

Komence mankis protektadon de ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kaj tio estis certgrade solvita per la Eŭropa Socia Ĉarto de la 18-a de oktobro 1964, akceptita en Torino (Italio) kaj ekvalida la 26-an de februaro 1965. La rajtoj agnoskitaj en la Eŭropa Socia Ĉarto tamen ne estas postuleblaj al la membroŝtatoj kaj ĉiu ŝtato rajtas elekti plurajn por efektivigo.

Laŭ la Ĉarto la kontrolsistemo konsistas nur en la pristudado de la raportoj kiuj sendas la membroŝtatoj prezentitaj ĉiu duan jaron.

La Konsilio de Eŭropo ĝis nun tre bone funkcias por la defendo de la homaj rajtoj de la eŭropanoj.

M.R.Urueña

ESPERANTO EN SEVILJA LINGVA RENKONTIĜO



La 24an de Aprilo 2025 okazis en la sevilja mezlernejo Diamantino García lingva renkontiĝo. Temas pri ekspozicio pri lingvoj kaj lingvaj aferoj. Gabriela kaj Viko estis invititaj prezenti Esperanton.



De antaŭ du jaroj ni kreis ludeton pro simila situacio. La ludeto nomiĝas ANTO kaj konsistas en du partoj. Dum la unua, la ludanto ricevas malgrandan folion kun prezento de Esperanto, kelkaj vortoj kaj kelkaj lingvaj reguloj. Gabriela aŭ Viko klarigas, demandas kaj respondas rilate al la enhavo de la folio kaj al la duboj kaj komentoj de la ludantoj.

Dum la dua parto, la partoprenantoj promenas inter arboj, muroj kaj kolonoj, kie pendas enplastigitaj dezegnaĵoj kun Esperantaj vortoj el kvin kategorioj: substantivoj, adjektivoj, verboj, adverboj kaj afiksoj. Ekzemple: domo, granda, ami, fine, et. Ili devas superi tri nivelojn. En la unua, oni ŝanĝas la kategorion de iu vorto. Ekzemple: de domo, kreigaŝ dome. En la dua, oni faras kunmetadon. Ekzemple: ameti. En la tria, oni konstruas frazon. Ekzemple: mi amas mian domon. Pro la celo sukcese spekti la tri nivelojn, ili multe demandas, donas ekzemplojn, petas klarigojn ktp.



La partoprenantoj ludis grupete. La sperto daŭris du horojn. Pluraj el ili montris malaltan intereson, malgraŭ la eblo, ke ĉiam ĉie povas resti ia spuro. Sed aliaj pluraj multe scivolemis, enmetiĝis en la aferon kaj demandis pri rimedoj lerni. Unu el la junulinoj eĉ iĝis teamano, kaj mirinde klarigis al aliaj pri la ludo kaj pri la lingvo.

Same kiel en similaj okazaĵoj, Gabriela (10-jaraĝa) iel estis spektaklo pro sia kapablo precize klarigi pri ĉio, solvi dubojn, gvidi ktp. Kelkaj petis ŝian amikecon kaj demandis pri telefonnumero, kiun ŝi kompreneble ne havas.

Oni profitis de la okazaĵo disvastigi la ekziston de HEJ kaj TEJO, prezentante Pasportan Servon kaj IJK-on.



Skribis Viko

ONOMATOPEOJ EN BIRDONOMOJ

Kiam aperas intereso por birdoj tre ofte gravas observado (ankaŭ aŭskultado) kaj nomoj. Ni aliru al birdonomoj kaj speciale al tiuj, kiuj rilatas al kanto. Oni ĉirkaŭkalkulas inter ses kaj sep mil lingvoj en la mondo kaj kvankam kelkaj, kiel angla kaj la scienca latino havas nomon por ĉirkaŭ dek mil specioj, multaj aliaj apenaŭ havas nomon por kelkaj centoj. Totale temas pri ĉirkaŭ unu miliono da birdonomoj. Evidente ni nun trarigardu nur kelkajn dekojn de nomoj en kelkaj lingvoj, kio pruvos la universalan tendencon atenti pri birdovoĉoj. Aliaj evidentaj tendencoj estas atento pri la aspekto (ruĝgorĝulo, blugorĝulo, krucbekulo ktp.) aŭ la konduto (abelmanĝulo, mielindikanto, muŝkaptulo ktp.), sed ni koncentriĝu al la voĉoj.

Esperanto dekomence fiksas sian atenton en la latina scienca nomo por krei siajn birdonomojn (same kiel por aliaj bestoj, plantoj, ktp.). Tial ĝi suferas malavantaĝon kompare kun la naturaj lingvoj en la senco, ke tiuj povas pli riĉe atenti pri la naturo de ekzemple birdoj. Tradicie multaj kulturoj atentis pri tio, kaj tiu procezo transiras de lingvo al lingvo kaj tra jarcentoj (aŭ jarmiloj), kio komplikas la aferon, sed tio povas havigi interesajn ideojn kaj pri birdintereso en diversaj kulturoj kaj pri rilatoj inter diversaj lingvoj.

Onomatopeo estas la procezo de vortoformado imitanta sonon. Tre probable pralingvoj uzis tiun rimedon por la kreado de vortoj ĝenerale. Se temas pri onomatopedevanaj vortoj, ne ĉiuj lingvoj alvenas al la sama rezulto; estas konata kiel la kokeriko estas komprenata en diversaj lingvoj simile onomatopee, sed ankaŭ tre diference. Ni eliru el la nomoj de konataj birdoj, sed eble la esperantlingva nomo ne estas tiom onomatopea, pro sia latina origino. La nomo ekzemple de la koturno evidente estas simpla adaptaĵo de la latina "coturnix". Sed ilia nekonfuzebla kanto aŭdata printempe rezultas en galega paspallás, en asturia parpayar, en slavaj lingvoj kaj en rumana prepelica, en litova putpelė, en letona paipala, en pikarda carcaillou, kio jam sugestas, ke en tre diversaj lokoj kaj kulturoj oni rilatas tiun birdon kun ties kantovoko.

Kaj ne nur kanto gravas. Estas specio en kiu estas karaktera ne la voĉo, sed la bruo de la ekflugo, tio estas la sisón en kastilia kaj sisão en portugala. Ne estas similaj nomoj en proksimaj lingvoj, sed strepet en kelkaj slavaj lingvoj, smatrap en sveda, mezeldek en turka, pikkutrappi en finna, ĉiuj tre apartaj lingvoj, sed ŝajne interkonsentintaj pri nomoj kiuj iel aludas al la sonora ekflugo de la malgranda otido.

Foje la konektoj interlingvaj interplektiĝas. Eble la hispanlingva nomo de la ardeo (garza) ne estas tiom onomatopea, sed ja iel similas al la grako de tiu birdo ĉu pro alarmino aŭ dumfluge. En angla heron, franca héron, itala airone, ŝajne oni serĉis alian manieron imiti tiun grakon. Grahegre aŭ grahegri en nordiaj lingvoj ja ŝajnas pli proksimaj al grako, sendepende ĉu la vera etimologio estas alia. Tio kondukas nin al la nomo de la pigo (urraca) en aragona garza, en kataluna garsa kaj en itala gazza, tiel du birdospecioj kun tre diferencaj voĉoj, sed same stridaj kaj kun similaj nomoj. Aliaj nomoj de la

urraca (pigo) en tre foraj lingvoj, kiel la greka karakaxa, la azera say-sayan, la estona harakas, la finna harakkas, la hungara szarka, la litova sharka, la letona zagata, en pluraj slavaj lingvoj svraka, konfirmas la onomatopean devenon de la specinomo.

Kaj de la urraca oni iru al la carraca (koracio), estante ambaŭ specioj iom stridaj. En aliaj latinidaj lingvoj tiu specio havas tre diferencajn kaj ne onomatopeajn nomojn, sed en eŭska estas same karraka, kio sugestas ĉu eŭskan devenon por la kastilia vorto ĉu komunan antaŭromian devenon. Pli for, la norvega blarake, la sveda blakraka, la bielorusa sibagrak kaj ĉuvasa kabakkirak, indikas klaran atenton al la strida voĉo de la koracio en tre apartaj kulturoj. Kaj el carraca al curruca (silvio), du tre apartaj ĝenroj kun tre diferencaj voĉoj, sed kun tre similaj nomoj en hispana. Tiukaze komparo kun aliaj lingvoj ne havigas rezulton, eble pro la apartemo kaj milda voĉo de silvioj, kaj nur en persa aŭ finna estas io simila al kantimito.

Pli certa estas la kazo de la turto, de la latina "turtur", evidenta onomatopeo. En azerbajĝana kurkur, en kimra turtur aŭ durtur, en dana turteldue, en germana turteltaube, en estona turteltuvi, en finna turturikyhyky, en franca tourterelle, en angla turtle, en islanda turtildúfa, en pola turkawka, en paŝtoa kurkuri, en rumana turturica, en albana turtullesha, en sveda turturduva, tiu specio havigas la plej unuaniman kazon de onomatopea nomo, kaj eĉ la elekton tiukadre de la silabo tur, ripetita en turtur. Eĉ en galega kaj portugala kiel rula kaj rola, for de la komuna transkribo de la sono, estas aludo al la tipa kverado de la specio.

Simila kazo estas la kukolo (en hispana cuco, en latino "Cuculus canorus", kie estas kaj onomatopeo kaj adjekto "canorus", kantisto). En afrikansa koekoek, same kiel en la origina nederlanda, en germana kaj en alemana kuckuck, en araba ukuk, en azera kukuk, en bretona koukoug, en kataluna cucut, en korsa cuccu, en greka kukos, en estona kagu, en eŭska kuku, en finna kaki, en franca coucou, en hungara kakukk, en itala cuculo, en berbera tikkuk, en kurda pepuk, en litova gegute, en rumana cuc, en slovaka kukuchka, en slovena kaj serbkroata kukavica, en tagala kakok, en turka guguk, en uzbeka kakku tiuj nomoj montras universalecon inter tiom foraj lingvoj kaj popoloj.




Simila kanto al tiu de la kukolo estas tiu de la upupo (abubilla), sed trinota anstataŭ dunota, evidente en la latina "upupa". En Hispanio estas diversaj lokaj nomoj, kiel cucut (kiel kukolo en kataluna; sed upupo en kataluna estas puput), porput, burbut, gurgut, cuscute, parputa, abubute, apupu ktp. En fremdaj lingvoj estas io kiel hupú en kelkaj ĝermanaj lingvoj, en korsika puppusgiula, en franca huppe, en irlanda húpú, en serbkroata pupavak, en java hudhud, en litova kukutis, en letona pupukis, en okcitanaj puput, en turka ibibik. Denove unuanimeco.

Tre facile identigebla pro melodio kaj tembro estas oriolo (oropéndola); eble en kastilia la onomatopeo ne estas tiom evidenta kiel en Esperanto aŭ en la kataluna oriol, kiu krome estas ankaŭ persona nomo; sed aliaj dialektaj katalunaj nomoj referencas supozitan kutimon de tiu specio manĝi figojn, kvazaŭ nur ili faras tion, kiel menjafigues, figuer, figuerol, panfigol, papafigues. Kurioze ankaŭ aliaj pli foraj lingvoj preferas tiun aludon anstataŭ onomatopeon, kiel la portugala papa-figos aŭ la greka sukofagos. Sed multaj pliaj lingvoj imitas la kanton de la oriolo, kiel norvega, alemana, germana kaj dana pirol, en estona peoleo, en franca loriot, en irlanda oireal, en hungara sargarigó, en itala rigogolo, en pikarda lulliot kaj en rumana grangur.

Aliaj birdonomoj ne estas onomatopeaj, sed ankaŭ aludas al la voĉo de la specio kiel la fajfanaso, la ridmevo inter aliaj, kaj en latino "Garrulus glandarius", "Clamator glandarius", "Coracias garrulus", en kiuj almenaŭ tri de kvar terminoj mencias la bruegon de tufkukoloj, garoloj kaj koracioj. La granda paruo (carbonero) ne estas en hispana onomatopea nomo, sed en eŭska estas kaskabeltz, kaj la Eŭropa kanario estas txirriskit.

Plian liberecon ol tiu de birdonomoj ĝuas Esperanto se temas pri la birdovoĉoj mem. Tiel anaso kvakas, ansero gakas, cikonio klakadas, kokino klukas, kukolo kukuas, strigo ululas, mevo knaras, pego taktakas, meleagro gluglugluas kaj korvedoj grakas.

Kani



LA STRANGA ANGULO

Ĉapitro 15a

19-jaraĝa

Mi vere deziras, ke vi atingu jam 19 jarojn kaj eblu, ke mi parolas kun vi! Laŭ tio, kion mi kapablas memori, mia patro kaj mi neniam havis ion, kiu similas al ia konversacio. De tempo al tempo li petas, ke mi alportu brikojn aŭ sitelon da akvo, ke mi kribu la sablon, ke mi miksu gipson, ke mi purigu la plankon, ke mi iru vidi, kion mia patrino pretigis por la matena manĝeto. Mi amas lin. Kaj mi timas lin. Li estas stranga estaĵo, pri kiu mi sentas ion simile al amo, eble ĉar mi vidas lin ekde mia naskiĝo. Mia patro estas tiu homo, kiu respondas "Li estas pli stulta ol bastono!" kiam laboristo rigardas lin kaj diras "Ho! Kia envio! Via filo ĉi tie, helpante vin!"

Mi, pensante mallaŭte, por ke tio, kion mi pensas, ne elŝovu el miaj oreloj, diras al li: "Paĉjo, se vi volas, vi jam povas paroli al mi. Mi estas stulta, sed mi povas kompreni vin. Mi *volas* kompreni vin." Mi ruĝiĝas. Kiel mi povis imagi tion!

Li plu rigardas min. Ŝajnas, ke li sindemandas, ĉu estas io pri kio mi utilas.

Mi ridetas nerimarkeble.

Mia kapo kliniĝas.

Mi fintrinkas la bieron.

De tempo al tempo li vizitas min en sonĝoj. Ĉiam estas ene de konstruo. Senfino da betonaj kolonoj ĉirkaŭas nin. Ĉie estas humide. La betono estas freŝa. Mi portas kelkajn aĵojn kaj petas lian opinion. Ni parolas tiel, kiel neniam antaŭe okazis. Tio estas, ni kunmetas tri aŭ kvar frazojn, unu post la alia, sen atendi la sekvan tagon. "Filo! Mi iras kun vi. Atendu

min, ke mi pretiĝos rapide." "Paĉjo, vi ne povas fari tion." "Kial vi diraĉas tion? Atendu, ke mi iras kun vi." "Paĉjo, vi estas morta!" "Diable! Mi ĉiam forgesas tion!" Kaj mi lasas lin tie, en la universo de betonaj kolonoj. Mi iras al la sekva sceno, kie li jam ne aperas. Kaj mi ne sentas amarecon. Tio, kiom mi sentas, estas kompatato. Mi sentas kompaton, ke ni neniam havis tiun konversacion, kiam mi estis 19-jaraĝa.

"Panjo, ĉu vi manĝis?" "Viko, filo, ĉu mi diris al vi, ke mi neniam iris al lernejo, ke ĉion, kion mi scias, mi lernis danke al vi ĉiuj?" "Jes, Panjo, vi diris tion multfoje, sed ĉu vi manĝis ion? Vi estas eĉ pli maldika." "Mi estas tre maldika, filo. Mi perdas pezon. Hodiaŭ mi sangis denove el miaj partoj. Mi sekiĝos. Sed ne zorgu pri mi. Vi havos patrinon por longa tempo. Nur okazas, ke mi havas fermitan stomakon. Nenio eniras." "Sed vi devos manĝi ion, ĉu ne?" "Manĝi? Ĉu vi volas ion? Ĉu mi fritu ovojn?" "Ne, Panjo, ne zorgu, mi satas." "Mi ne iris al lernejo, mi ĉiam havis multajn erarojn pri ortografio." "Sed ne plu, ĉu ne? Diru al mi, ĉu vi fartas bone?" "Bone, filo. Mi bone. Kial vi ne manĝis? Mi fritos ovojn. Via patro estis fulo, aĉulo... Ne lasu min sola. Mi bezonas vin tre multe." "Jes, mi estas ĉi tie, apud vi, Panjo." "Mi neniam havis patrinon. Via avino estis putino. Kaj mi vidis, kiel viroj batis ŝin. Ŝi kriadis -For de ĉi tie! For!- Ŝi ne

amis min. Ŝi karesis ilin, ne min. Mi kreskis laborante. Kun dek jaroj mi iris serĉi akvon per siteloj kaj alporti ilin sur longa senfina vojo. Rigardantoj diradis -Ho! Kia bona edzino por malriĉulo!- Kaj mi geedziĝis kun malriĉulo. Kia malbona viro estis via patro! Mi neniam havis patrino. Ĉiam karesante aliajn! Tiu ne estis patrino." "Sed tio jam pasis. Vi suferis multe. Sed tio jam estas parto el la estinteco." "Mi pensas, ke mi daŭros malmulte da tempo. Sed vi ne zorgu, filo. Hodiaŭ mi sangis denove. Ĉu vi riparis tion, kion mi diris al vi? Ĉu vi vizitis la advokaton?" "Jes, Panjo. Mi renkontiĝis kun li." "Ĉu vi parolis kun via frato? Mi zorgas pri li. Nepre helpu lin. Li havas malbonan edzino." "Jes, Panjo, mi parolis kun li." "Kia malbona korpo mi havas! Ĉi tio ne estas vivo. Ĉu vi manĝis?"

Mi lernis, ĉar mi ne volis imiti ilin. Iam mi estos patro. Kaj tiu patro ne similos al la mia. Mi amas miajn gefilojn. Mi zorgos pri ili. Mi diros al ili "Mi amas vin." Mi atendos ilin post la lernejo kun rideto kaj brakumo. Mi kaptos iliajn manojn kaj ni kantos survoje revenante hejmen. Mi ludos kun ili. Ni faros petolaĵojn. Ni ne sidiĝos por la celo plenumi hejmtaskojn. Tio, kion ni faros, estos rakontoj, kantoj, ludoj. Ni spertos senutilajn stultaĵojn. Mi volas vidi ilin kreski liberaj, feliĉaj, kun imagkapablo kaj ĝojo. Mi volas akompani ilin, por ke ili sentu, ke estas iu, almenaŭ unu persono, kiu kredas je ili, kiu amas ilin tiaj, kiaj ili estas. Mi ne imitos miajn gepatrojn. Mi ne komparos miajn gefilojn kun aliaj. Mi neniam diros al ili, ke ili ne valoras, ke ili ne utilas, ke ili lasu min en paco, ke aliaj estas pli bonaj. Mi volas, ke ili neniam kapablu pensi, ke mi havas planon por ili, ke mi volas, ke ili estu io specifa, ke ili realigu miajn revojn aŭ kresku, kiel mi ŝatintus kreski. Ili ne estos mia realiĝo, mia sonĝo, mia revo, mia io. Mi ne imitos miajn gepatrojn. Mi ne volas fanfaroni pri miaj gefiloj, nek montri ilin kiel trofeon. Ili estos tio, kion ili volas esti, en sia bela malperfekteco, sen formo, sen sklavaĵoj; respondeculoj, indaj homoj, amemaj, etikaj, sed ne sklavo, eĉ ne de si mem. Sed mi ne scias, ĉu mi kapablos. Mi ne havas referencojn. Mi ne scias, kiel fari tion.

Kaj mi timas.

Mi timas rigardi min en la spegulo. Kaj renkonti ilin.

Skribis Viko

LA KONGRESUNTO

(Anekdoto)


Inter la multaj homoj, kiujn mi kare memoras el la kongreso en Sorio, mi volas rememori pri unu, kiu ne venis.

Boguslaw aliĝis jam en oktobro, ok monatojn frue. Li frue mendis la bankedon kaj ambaŭ ekskursojn. Li frue rezervis la flugon el Bazelo ĝis Madrido kaj busbileton al Sorio, por alveni al la celo kelkajn tagojn frue. Sed jen, la misfortuno tordis lian bone planitan vojaĝon. La lundon 28an de aprilo li okupis sian lokon en la aviadilo, atendis, atendadis kelkajn horojn senmove, ĝis oni informis ke la flugo ne okazos pro elektra paneo en la tuta Iberia duoninsulo. Eĉ pli malbone, ne eblos flugi en la sekvaj tagoj.

La organizantoj kun bedaŭro redonis al li la monon de la mendoj kaj la aliĝo. Espereble ni vidos nin en la sekva.

Manolo Parra

ARTIKOLO PRI LA HISTORIO DE ESPERANTO EN ZAMORO



Ĵus publikigita studaĵo ekzamenas la Esperantomovadon en Zamoro inter 1908 kaj 1936 kaj malkaŝas ĝian kulturalan efikon. La artikolo, verkita de la esploristo Carlos Coca Durán kaj publikigita en la numero 27 de la portugala revuo “Côa Visão”, titoliĝas *Esperantistas y rayanos. La lengua internacional del esperanto en Zamora (1908-1936)* (Esperantistoj kaj limanoj: La Internacia Lingvo Esperanto en Zamoro).

Ĉi tiu artikolo lokigas Zamoron kiel unu el la plej aktivaj centroj de Esperanto en Hispanio dum la unua triono de la 20-a jarcento kaj savas el la forgeso multajn kulturajn figurojn el Zamora, kiuj defendis tiun ĉi internacian lingvon kiel simbolon de progreso, libereco kaj kompreno inter popoloj.

En sia esploro la aŭtoro indikas, ke Esperanto, la lingvo kiu celis transformi la mondon, havis longan historion en Zamoro, iĝante populara pedagogia movado, kiu estis la antaŭulo de la hodiaŭaj lingvolernejoj.

La origina studo estis farita de profesoro Carlos Coca Durán, kiu tiel finpritraktas temon, kiun li antaŭe traktis en alia studo dediĉita al la iama Popola Universitato de Zamora. La aŭtoro estas specialisto pri la sociaj kaj kulturaj movadoj de la 1930-aj jaroj, same kiel pri la figuro de la poeto León Felipe, kaj kunverkis kun Jordi Maíz la libron *Un verso en la trinchera. El grito revolucionario de León Felipe* (Verso en la Tranĉejo: La revolucia krio de León Felipe).

La artikolo, legebla ankaŭ en la retejo de *Ser Histórico* (vidu ĉi tie: <https://serhistorico.net/2025/06/05/esperantistas-y-rayanos-la-lengua-internacional-del-esperanto-en-zamora-1908-1936/>), reliefiĝas, ke Esperanto daŭre vekas intereson hodiaŭ, eĉ kun simbolaj detaloj kiel la uzo de la termino *Fromaĝo* (tiel, en Esperanto) por aludi la Zamoran fromaĝfoiron. Tio estas pruvo, ke ankaŭ la planlingvo, kiu revis unuigi la homaron, vivas plu en la loka memoro.

La artikolon eĥis la lokaj amaskomunikiloj, kiel vi povas legi en tiuj ĉi ligiloj: <https://www.laopiniondezamora.es/comarcas/2025/06/15/esperanto-huella-lengua-mundo-zamora-118626482.html> kaj <https://www.zamoranews.com/articulo/cultura-turismo/estudio-recupera-movimiento-esperantista-zamora-1908-1936-revela-impacto-cultural/20250619122250337521.html>.

IOM DA MATEMATIKO (18)

Kiom longdistance troviĝas horizonto?


De niaj jaroj en elementa lernejo ni scias ke horizonto estas tiu linio, kie la tero (aŭ la maro) ŝajnas kuniĝi kun la ĉielo.



Kompreneble tiu linio ne ekzistas. Temas pri simpla vida iluzio, kiu trompas niajn okulojn. Estas sciite, ke tero kaj ĉielo, aŭ maro kaj ĉielo, ne kuniĝas.

Sed pri tio ni povas fari al ni “infanan” demandon: je kioma distanco de ni troviĝas tiu ŝajna linio? (Pro sperto, ni scias, ke ofte la “infanaj demandoj” estas ne tiel “infanaj”, sed ke respondo al ili enhavas komplikaĵojn). Ekzemple, ni klopodu kalkuli la distancon al iu ŝipo, kiun ni rigardas el klifo sur la horizonto.

La situacion eblas reprezenti per la jena desegno:



Alimaniere dirite, se ni farus transversan sekcon de la Tero, eblas supozi ke nia planedo estas cirklo. La observanto troviĝas sur tiu cirklo kaj la distanco al la horizonto estas fiksita de la linio AV, t.e., de la vidlinio, kiu eliras el la okuloj de la observanto kaj estas tangenta je la Tero. Pro rondecado de Tero, sub tiu tangento AV, la Tero estas nevidebla de la observanto ĉar ĝuste ĉe la punkto H troviĝas la horizonto.

Skeme, sur la desegno,


O estas la centro de la Tero,

R estas la radiuso de la Tero,

h estas la alteco de la observanto ĝis okuloj.

H estas punkto ĉe la horizonto.


Geometria teoremo diras, ke en cirklo, linio tangenta al cirklo kaj radiuso ĉe la punkto de tangento estas ĉiam ortaj. Sekve, la triangulo OHA de la antaŭa desegno estas orta. Tiel, ni povas uzi la “Teoremon de Pitagoro” (Memoru!, tiu kiu diras ke “kvadrato de la longo de hipotenuzo egalas la sumon de la kvadratoj de la longoj de katetoj).



En la desegno, $OA^2 = AH^2 + HO^2$

Memoru, ke OH estas radiuso de Tero.

La longon de tiu radiuso de Tero ni povas kalkuli sen granda peno:



Kiel ni diris antaŭe, transversa sekco de Tero estas, pli malpli, cirklo kaj, la ekstera linio de tiu cirklo, circonfereco (aŭ

meridiano). Tre konata estas tiu aserto, ke longo de cirkonferenco estas $2\pi R$ (π estas la greka litero “pi”, kiu egalas proks. 3,1416 kaj R estas la radiuso de la cirkonferenco, en tiu ĉi kazo, radiuso de Tero).

Krome, nia nuna mezurunuo por longeco, nomata “metro”, kiel frukto de la franca revolucio de 1789, estis difinita tiel, ke la tera cirkonferenco (t.e., unu meridiano) longas ĝuste 40.000 km, nek unu milimetro pli, nek unu milimetro malpli.

$$\text{Kun } \hat{c} \text{io } \hat{c} \text{i, } 2\pi R = 40.000 \text{ km}$$

$$\text{Kaj de tie, } R = 40.000 / 2\pi$$

Se oni prenas kalkulilon por fari tiun operacion, oni vidos, ke la longo de tera radiuso egalas, pli malpli, 6.366 km. (certe ne tiel longa kiel oni antaŭpensas: proksimume, la distanco de Madrido al Novjorko).

Nun ni reiru al la orta triangulo, kiun ni forlasis supre kaj ni elektu homon, ekzemple 1,80 m. altan ĝis la okuloj, kiu troviĝas sur klifo 10 m. alta. Do, la alto de la okuloj de tiu homo rilate maran surfacon estas $1,80 + 10 = 11,80$ m. Kaj en nia triangulo, $OA = h + R = 11,80 \text{ m.} + 6.366 \text{ km} = 6.366,0118 \text{ km}$.

Uzante la pitagoran teoremon,

$$OA^2 = AH^2 + HO^2, \text{ t.e.,}$$

$$AH^2 = OA^2 - HO^2 = (6.366,0118)^2 - (6.366)^2 = 150,24$$

Sekve, AH longas la kvadratan radikon de 150,24, t.e., **12,26 km**

Kompreneble, ju pli alte ni troviĝus des pli longa estus la distanco al la horizonto. Ekzemple, se la antaŭa homo troviĝus sur la plej alta monto de la hispana duoninsulo, t.e., sur la monto Mulhacén (3.500 m. aŭ 3,5 km.), farante la samajn kalkulojn,

$$AH^2 = OA^2 - OH^2 = (6.366 + 3,5)^2 - (6.366)^2 = 44.574,25$$

Sekve, AH , la distanco al la Horizonto estus **211,13 km**

Kaj se la horizonto estus alta montarĉeno kaj ne glata grundo, la distanco plilongiĝus. Tio faras, ekzemple, ke neĝo de Sierra Nevada estu videbla el montoj de Cádiz (pli ol 300 km de distanco).

Jesús M. García Iturrioz
jmgiaa@hotmail.com



